

Leterkesto, 4.

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1991.11.07 & 09

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND nome de Svisa Radio Internacia.

La pasintan semajnon ni interrompis nian salutadon al skribintaj aŭskultantoj anoncante interesan respondon al niaj demandoj fare de nia portugala blinda aŭskultanto João LAGARTIXA (Ĵuakim LAGARTIŜA), kiu tajpas belaspektajn leterojn. Ni ne imagis, ke li ne povas relegi ilin. La respondo de Ĵuakim LAGARTISA en Mora, Portugalio, certe interesos multajn geaŭdantojn. Tial ni citas kelkajn erojn el ĝi:

A.- "Jes, mi mem tajpas tute sendepende miajn leterojn kaj ĉiun ajn dokumenton, kiun mi bezonas legi al vidanta persono. Cetere, se mi ne scius tajpi, mi ne povus labori en tia profesio kia la mia. Mi estas instruisto kaj deĵoras en tute normala lernejo de nia ŝtata eduksistemo. Antaŭ kelkaj jaroj, mi universitate diplomiĝis pri historio kaj tio alireblis min en tiun instruistan fakon. Inter miaj gekolegoj, mi ĝuas la amikecon de multaj, kiuj volonte pretas helpi al mi en pluraj terenoj, inter kiuj troviĝas Esperanto. Kvankam neniu el ili, bedaŭrinde, scipovas la lingvon, ili malrapide laŭtlegas al mi viajn leterojn, elparolante la vortojn, kvazaŭ ili estus legantaj portugalajn tekston. Kompreneble, tio iom malfaciligas al mi la asimiladon de la teksto, sed la afero marŝas sufiĉe glate, kaj ebligas la komprenon de viaj mesaĝoj. Alifoje estas familianoj, kiuj helpas al mi sammaniere. Kelkaj el miaj kolegoj, dank' al tiu procedo, iom scivolemiĝis pri Esperanto kaj lernus la lingvon, se disponeblus ĉe ni kursoj kaj materialoj. Bedaŭrinde la portugala esperanto-movado estas tre malforta - kaj Lisbono ne proksimas de ĉi tie. Mi laboras en la provinca urbeto - Evora."

Cl.- La pasintan semajnon ni alvokis favore al registrado de laŭtvoĉa legado de valoraj beletraĵoj. Ni scias, ke inter niaj aŭskultantoj pluraj estas blinduloj, kiuj ŝatus lupreni tiajn registraĵojn. Bonvoluloj ekrilatu kun ni skribante al Svisa Radio Internacia, kaj ni kontaktigos ilin kun Ĵuakim LAGARTIŜA en Mora, Portugalio.

A.- Multaj esperanto-kluboj stagnetas pro manko de reala okupo utila. Kial en kelkaj el ili ne formiĝu grupo de laŭtlekantoj kaj de registrantoj? Per la kanalo de Svisa Radio Internacia ni volonte konsilos ilin. Ni scias, ke la nombro de la blindaj aŭ blindiĝantaj esperantistoj estas pli granda, ol oni ĝenerale opinias.

Cl.- Ĵiri LAUBE en Roudnice, Ĉeĥoslovakio, sendis du mesaĝojn. Li vigle esprimas lingvan vidpunkton preskaŭ kontraŭan al tiu de Ĵuakim LAGARTIŜA, kiun ni prezentis la pasintan semajnon. Tial ni citos la plej signifajn erojn el tiu longa letero, kiu respegulas tre oftan sintenon en esperantujo:

A.- "Kun sinceraj salutoj mi volus reagi al via programo de la 2-a de majo 1991, skribas Ĵiri LAUBE, nome al la demando de plua evoluo de Esperanto. Kiom mi scias, en esperantujo jam delonge ekzistas du direktoj, du konceptoj:

Cl.- "a) en la periodo de batalado pri ekzisto kaj disvastigo de Esperanto oni devas konservi la avantaĝojn de la lingvo; Esperanto ne havas literaturon kompareblan kun la aliaj lingvoj, ne havas evoluantan fakan terminologion uzeblan en la scienco kaj teĥniko, ne havas financajn rimedojn por propagandi la lingvon. Tio estas la - simple dirite - materiaj mankoj. Sekve necesas konservi la simplecon, facilecon, precizecon de la lingvo. Tiaj povas esti argumentoj en nia senpoveco... Ni devas montri, ke Esperanto estas facile atingebla ponto-lingvo.

A.- "b) aliaj homoj postulas, ke Esperanto fariĝu plej eble baldaŭ lingvo riĉa je esprimoj, komparebla kun aliaj gravaj lingvoj. Al kelkaj homoj imponus, se esperanto havus multe da sinonimoj por povi priskribi aĵojn poetece larĝe. Al kelkaj homoj, neesperantistoj, ne plaĉas, ke Esperanto kapablas esprimi ĉion tre simple. Ili eĉ primokas, ke, se Esperanto estas ellernebla en kelkaj monatoj, ĝi ne povas esti perfekta, ĉar nur komplikaj lingvoj estas sufiĉe evoluintaj...

Cl.- "Mi ĉiam argumentas, daŭrigas Ĵiri LAUBE, ke estas granda avantaĝo de Esperanto, ke ĝi estas ĉiam la sama, ke oni povas legi literaturaĵojn de la unua epoko same bone, kiel la plej novajn. Mi vidas, ke mi menciis du tiklajn punktojn samtempe:

A.- "a) ke oni povas legi la plej malnovajn verkojn, tio estas ke la lingvo estas ĉiam la sama,

Cl.- "b) kaj la dua duono de la frazo: ke oni povas same bone legi la novajn verkojn. Ĉi tiu dua duono ne estas tute prava, ĝuste pro la neologismoj. En la lasta tempo ŝajnas, ke oni devas legi esperanto-tekstojn kun angla vortaro enmane."

A.- Ĵiri LAUBE distingas inter kontraŭaj celoj:

Cl.- "a) iuj diras, ke Esperanto estas normala lingvo, kiu evoluas kaj komplikiĝas kiel la aliaj lingvoj.

A.- b) aliaj diras, ke Esperanto estas kreita kiel ponto-lingvo...

Cl.- Kaj Ĵiri LAUBE, kiu apartenas al tiu tendenco, proponas tiun ĉi bildon:

A.- "Mi laboras por la koncepto de "ponto-lingvo". Oni povus kompari nian demandon kun la surstrata trafiko: Se ni veturas per aŭtomobilo, ni ofte ne perceptas, ĉu ni veturas en normala strato aŭ surponto. La ŝoseo surponto estas la sama, la trafiksignoj la samaj, trotuaroj la samaj. Nur domoj kun vendejoj kaj restoracioj ne estas, mankas ankaŭ arboj kaj florbedoj, ne estas parkejoj, ktp. Tion ni povas ĝui nur post kiam ni atingas la alian bordon. Same ĉe Esperanto: ekipi ĝin per ĉio, kio estas necesa por sekura, klara kaj agrabla transiro al la alia "bordo", tio estas al la alia lingvo kaj kulturo. Arboj, floroj, vendejoj kaj restoracioj estas bonaj kaj necesaj, sed ne konvenas por ponto. Same en Esperanto. Simpleco, facileco kaj klareco de la lingvo estas ĝia avantaĝo, ĝia valoro..."

Cl.- Kion respondi al Ĵiri LAUBE? Unue, respondi ke la aserto, ke la lingvoj evoluas al kompiikiĝo estas trompa antaŭjuĝo bedaŭrinde ofta en esperantujo. Lingvo-riĉiĝo ne kondukas al lingvo-komplikiĝo kaj ĉiuj lingvoj tendencas al reguliĝo laŭ interna logiko, ankaŭ Esperanto. Due, respondi ke lingvoj ne povas resti ĉiam la samaj, ĉiuj nepre evoluas kaj pliriĉiĝas, ankaŭ Esperanto. Trie, respondi ke la proponita nocio de ponto-lingvo tre foras al la strebado de Zamenhof. Ni ne forgesu, ke Zamenhof per siaj esperantigoj de beletraĵoj plej vigle kontribuis al la leksika riĉiĝo kaj stila nuancigo de la proponita helplingvo. Kiu atente relegas liajn paroladojn konstatas, ke li kontraŭstaris la ideon, ke Esperanto estu nura ponto-lingvo aŭ neŝanĝebla kodo. La esperantistoj ne celas nuran veturon de sia lingvo al aliaj lingvoj. Pere de tradukoj kaj de rektaj kontaktoj parolaj ili celas la realan malkovron de kulturaj valoraĵoj, kiuj kaŝiĝas malantaŭ fremdaj lingvoj. La bildo de strato nuda, sen arboj, sen floroj, sen vendejoj kaj restoracioj fremdas al la penso de Zamenhof kaj al tiu de la plimulto de la esperanto-parolantoj,

A.- kaj antaŭ ĉio fremdas al la penso de la verkistoj, kiuj elektis Esperanton kiel esprimilon.

Cl.- Tra tiuj verkistoj kaj tra ĉiuj esperantistoj, kiuj flue parolas la lingvon, efektiviĝas la poluriĝo kaj nuanciĝo de la zamenhofa lingvo. Dum la vintro ni dediĉos kelkajn elsendojn al kurseto, kiu malkovrigos la evolu-tendencojn de Esperanto per analizo de karakterizaj tekstoj diversepokaj.

A.- Vi aŭdis leterkestan elsendon de Svisa Radio Internacia, kiun ni daŭrigos venontsemajne. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND. Ĝis la reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), aŭgusto 2012*